

## Ŝtate agnoskita E-klerigkurso

Granda sukceso por Asocio de Germanaj E-Instruistoj kaj Interkultura Centro Herzberg (ICH), klerigejo de GEA: En marto 2011 okazis „E-klerigferiado“ en Herzberg. La 14-hora kurso de la regiona popola altlernejo estas oficiala klerigoferto por plenkreskuloj. Eble en la 1960-aj jaroj sub gvido de rektoro H. Sonnabend (iama prezidanto de ILEI), okazis la lasta ŝtate agnoskita E-trejnseminaro en Germanio. Normalkaze nur ampleksaj politikaj seminarioj, kursoj de la angla lingvo, specialaj komputilkursoj estas ofertataj laŭ „klerigferioleĝo“. Do, por la faka programo detale ellaborita de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar la regiona popola altlernejo petis permeson de la ministerio pri edukado en Hannover. Post iom da prokrasto la „klerigferiado“ ricevis la ŝtatan agnoskon. Pri „klerigferiado“: dungitoj havas la rajton unufoje en la jaro peti unusemajnan „klerigferiadon“ por agnoskitaj seminarioj kaj ĉe agnoskitaj institucioj. La laborondonanto devas pagi la normalan salajron kaj devas aldoni la partoprenatestilon al la personaj aktoj de la laboristo. Tiu klerigperiodo ne forprenas la regulajn feriotagojn. Pro tio, ke ĝi estas oficiala ŝtata kurso, oni rajtas peti redukton de imposto pro la kostoj de veturo, tranoktado, manĝoj, partoprenkotizo ktp. (Zsófia Kóródy)

## Japanio kaj Esperanto

Interretaj raportoj kaj mesaĝoj de E-istoj pri la tertrema, cunama, kaj nuklea-centrala katastrofoj en Japanio bildigas la homan kaj esperantan flankojn de la afero, speciale la ĉiutagaj taglibraĵoj de HORI Jasuo, facile legeblaj kaj bone aranĝitaj ĉe la retpaĝoj de [www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org). La taglibro de HORI ankaŭ disvastiĝas alilingven, ekzemple, en la franca. La informado komencas eliri el Esperantio kaj eniri en la eksteran mondon.

(Dennis Keefe,  
retgrupo „uea-membroj“)

## Nova retpaĝo por humurbildoj kaj bildstrioj en Esperanto

Amantoj de humurbildoj aŭ bildstrioj povas trovi novajn legindaĵojn ĉe [www.bildetejo.net](http://www.bildetejo.net). La konstante kreskanta retejo nun enhavas i.a. tradukitajn bildojn de „mycartoons.de“ kaj de „Gronk“.

(retgrupo „aŭstraj esperantistoj“)

## Pola Retradio en Esperanto bezonas subtenon



Barbara Pietrzak kaj Gabi Kosiarska

Fine de januaro novaj E-programoj de Pola Radio estis ĉesigitaj malgraŭ diversnivelaĵoj intervenoj kaj klopodoj restarigi ilian emisiadon. Laŭ iniciato de aŭskultantoj kaj de iliaj amikoj ĉe la fejsbuka Amikaro de Pola Retradio en E-o estiĝis klopodoj, ke tradicio de la parola E-komunumo ne malaperu. Ekde la 21-a de marto komenciĝis eksperimente la regulaj E-programoj de la Pola Retradio en E-o audiĝantaj lunde kaj vendrede (<http://retradio.posterous.com/>) sur preskaŭ nula financa bazo. La redakcia teamo esperas subtenon pro la petoj de la ĝisnunaj aŭskultantoj, kiuj ne sole rekonas la parolkulturajn signifon de la programoj, sed ankaŭ rimarkas en ili instruan kaj klerigan valorojn (UEA-konto: vars-t).

(B. Pietrzak,  
retgrupo „uea-membroj“)

## Prelego pri Baldur Ragnarsson en la Reta Kinejo

La prelego pri la poezio de B. Ragnarsson, farita de M. Nervi en la novembro Malferma Tago de la Centra

Oficejo de UEA, estas videbla en la Reta Kinejo de UEA. Nervi, mem elstara poeto, estas prezidanto de la Akademio Literatura de E-o. La prelego, kiu daŭris 54 minutojn, estas dividita en 4 partojn; la 1-a troviĝas ĉe: [www.ipernity.com/doc/97850/10260469/](http://www.ipernity.com/doc/97850/10260469/)

(ret-grupo „uea-membroj“)

## Disdonado de letero de EEU al ĉiuj eŭropaj parlamentanoj

Seán Ó Riain informis, ke Maja Tišljár, Jozef Reinart kaj li sukcese disdonis leteron de EEU al ĉiuj EPanoj la 5an de Majo en la Eŭropa Parlamento, en 22 el la 23 oficialaj lingvoj de EU (mankis nur la malta). M. Tišljár mendis, preparis kaj ordigis la tradukojn, aldonis la tekston de la himno ĉiam en E-o kaj en gepatra lingvo de la alparolato.

(Seán Ó Riain)

## Pli ol 7 mil elŝutitaj libroj en la Kiosko de La Ondo de Esperanto kaj eldonejo „Sezonoj“

Laŭ Maja statistiko oni elŝutis 7 mil 371 ekzemplerojn de libroj kaj gazetoj. Gvidas la statistikon „La pika damo“ de A. Puŝkin kun 1549 elŝutoj. La gazeto „La Ondo de Esperanto“ havis 1515 elŝutojn. La eldonistoj informas, ke aliaj libroj estos iom post iom enretigitaj.

([www.esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php](http://www.esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php))

## Ĉinio: studentoj amase lernas Esperanton

En la lernojaroj 2010-11 E-o estas unufoje enmetita en la regulan studprogramon de la Supera Mezlernejo de Tian Jiabing de la urbo Baotou, Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio. La unuajaruloj havas unu E-lecionon ĉiusemajne kaj la duajaruloj havas du ĉiusemajne. Entute 700 studentoj studas, kaj 110 studentoj sin anoncis por studi E-on ekster la regulaj lecionoj. En la

jaro 2005 ankaŭ la Scienc-Teknika Universitato de la Interna Mongolio en Baotou enkondukis E-on kiel elekteblan studobjekton, kaj ĝi daŭras en la nova semestro de la kuranta jaro. Entute 257 studentoj elektis E-on kiel nedevigan lecionon.

(retgrupo „landa agdo“)

### Internacia Kongresa Universitato dum la 96-a Universala Kongreso

21 universitatoj kaj aliaj fakuloj proponis prelegon por la 64-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos dum la 96-a Universala Kongreso en Kopenhago (23-30 de julio 2011). Tio estas pli ol duoblo de la 9 preletoj, kiuj konsistigos la programon de IKU. La Estraro de UEA elektis prof. Christer Kiselman kiel la rektoron de la 64-a IKU. La preletoj de E. Bojaĝieva, T. Sadan kaj A. Wandel estos samtempe kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)


### Leĝoprojekto pri Esperanto en Brazilo

En la Komisiono pri Edukado kaj Kulturo de la Deputita Ĉambro de la brazila Parlamento nomumiĝis nova raportisto por la leĝoprojekto kiu ebligas la instruadon de E-o en mezlernejoj. Tiu leĝo, jam aprobita en la brazila Senato, estis redaktita de C. Buarque, iama ministro pri Edukado kaj unu el la plej gravaj fakuloj pri edukado en la lando. Pro lia tutlanda figuro, la leĝoprojekto jam altiris atenton de la gazetaro. Ofte kun moka tono, meze de aliaj „ekzotikaj“ projektoj por edukado. Sed eĉ tiuj malfavoraj okazoj ebligis al la e-istoj amase reagi. La brazila Deputitaro devas aprobi la leĝoprojekton por ke ĝi prezentiĝu al sankcio de prezidentino D. Rousseff. La antaŭa raportisto de la leĝo antaŭ la deputita Komisiono pri Edukado kaj Kulturo A. Zito faris teknikan rimarkon

pri vortumo sed aprobis kaj subtenis la aprobon de la projekto. Antaŭ ol la leĝoprojekto eniris la tagordon en la semajnaj komisionkunsidoj, nova deputitaro elektis en la fino de 2010 kaj estis rearanĝo en la komisionoj. La nova raportisto estas deputito J. Bittar Junior. Brazilaj e-istoj proponas kontakti lin por montri ke E-o funkcias (*dep.joaobittar@camara.gov.br*). Subtenanta raportisto estas la unua ŝtupo por la aprobiĝo en la Komisiono.

(James Rezende Piton, UEA-ĉefdelegito por Brazilo)

### Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro



La ekzamenoj fariĝas pli kaj pli konataj kaj popularaj inter la E-parolantoj. La nombro de ekzameniĝantoj de tiuj novtipaj ekzamenoj de UEA kaj ITK (Ŝtata Lingvoekzamena Centro en Hungario) proksimiĝas al 300. Por klarigi la kunlaboron inter UEA kaj ITK kaj la rilatojn al ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo), UEA kaj ITK prezentis komunikon faritan en la hungara kaj E-o. En ambaŭ lingvoj la komunikado estas legebla en la retejo de ITK. Por konatiĝi kun la postuloj de la KER-ekzamenoj kaj por aliĝi al konvena ekzamensio vidu: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

### Diplomlaboraĵo pri Esperanto publike prezentita en Kroatio

Kruno Puskar, studento de la angla kaj germana lingvoj en la Universitato

de Zagrebo, prezentis la 15an de Marto en Klubejo de universitataj lekciistoj en Zagrebo sian diplomlaboraĵon en kiu li esploris sintenojn de kroataj esperantistoj pri E-o. La prelegon sub la titolo „E-o kiel (nova) eŭropa „lingua franca“ aŭskultis dudeko da zagrebanoj. Studento Puskar estis en sia urbo Krizevci elektita la persono de la jaro 2010.

(KEL-Zagrebo)

### UEA membriĝis en INFOTERM

Universala Esperanto-Asocio subskribis interkonsenton pri kunagado kun Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio. Per tio UEA fariĝis membro de Infoterm, fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstria Normiga Instituto (ASI). Infoterm celas i.a. interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp., ĉefe en la kampo de terminologio. Infoterm devenas el la terminologia esplorcetro, kiun fondis kaj longe prizorgis E. Wüster, e-isto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco. Infoterm funkcias ankaŭ kiel sekretario de la Teknika Komitato TC37 de Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kun kiu UEA havas oficialajn rilatojn. Pri la rilatoj de UEA kun Infoterm kaj TC37 de ISO respondecas nova komisiito, Mélanie Maradan el Svislando.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

### Senkostaj anoncetoj interretaj

Aŭstria Esperanto-Federacio atentigas siajn membrojn pri la senkosta FOIRO ĉe [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at), en kiu membroj per retmesaĝo aŭ letero al la administranto povas publikigi siajn anoncetojn. Esceptokaze ankaŭ nemembroj povas uzi tiun servon

(<http://www.esperanto.at/esperanto-in-oesterreich/esperanto-kleinanzeigen-foiro/>)

**Kolektis kaj prilaboris**  
**Uwe Stecher**